

# Ernest Renan (1823-1892)

Aŭtoro/tradukinto: Christian Bertin

Dato: Decembro 2007

## Tabelo de la enhavo

Ernest Renan (1823-1892).....	1
1 Resumo .....	1
2 Lia vivo .....	1
3 La ideoj de Renan.....	5
3.1 Demandoj pri la universo .....	5
3.2 Pri Bretonio .....	6
3.3 Pri judaismo.....	6
3.4 Pri Dio kaj la scienco .....	7
3.5 Pri arto.....	7
3.6 Pri islamo.....	8
3.7 Pri superaj kaj malsuperaj rasoj.....	8
3.8 Antaŭscio pri la estontaj militoj.....	10
4 Liaj verkoj.....	10
5 Citaĵoj de Ernest Renan .....	12
6 Referencoj.....	16

## 1 Resumo

Joseph **Ernest Renan** naskiĝis en Tréguier (Côtes-d'Armor, Bretonio) en la 28-a de Februaro 1823 kaj mortis en la 2-a de Oktobro 1892 en Parizo. Li estis franca verkisto, filologo, filozofo kaj historiisto.

Kiam li vivis, Ernest Renan estis precipe konata, kiel la aŭtoro de la populara *Vivo de Jesuo*. Tiu libro enhavas tre debatitan tezon, laŭ kiu la biografio de Jesuo devas esti priskribata, kiel tiu de iu ajn homo kaj la Biblio devas esti submetata al kritika ekzameno, kiel iu ajn historia dokumento. Tio estigis pasiajn debatojn kaj la koleron de la katolika Eklezio.

Renan famiĝis pro la difino de nacio, kiun li donis en sia parolado en 1882 « Kio estas nacio? ». Dum la germanaj filozofoj, kiuj Fichte, estis difinintaj la nacion laŭ objektivaj kriterioj, kiaj la « raso » aŭ la etna grupo (la Popolo), havanta komunajn karakterizojn (la lingvo por ekzemplo), Renan difinis ĝin simple per la volo kune vivi. En la kunteksto de la kverelo pri la aparteneco de la regiono Alzaco-Loreno, li deklaris, ke la ekzisto de nacio dependis de « ĉiutaga plebiscito ».

## 2 Lia vivo

Ernest Renan naskiĝis en familio de fiŝkaptistoj en Tréguier (Côtes-d'Armor, Bretonio) en la 28-a de Februaro 1823. Lia patro estis bretono kaj lia patrino gaskonino.

Lia patro estis kapitano de ŝipeto kaj ĝisosta respublikisto. Lia patrino estis filino de reĝismaj komercistoj de la apuda rubo Lannion.

Li estis 5-jara, kiam lia patro mortis. Lia fratino Henrika (Henriette), 12-jara pli aĝa ol li, fariĝis la morala estro de la familio.

Li studis en la seminario de Tréguier. La pastroj altnivele instruis al li matematikon kaj la latinan lingvon. Lia patrino kompletigis lian edukadon.

Li konfesis, ke dum lia tuta vivo, li estis ĉiam disŝirita inter la politikaj opinioj de siaj patro kaj patrino kaj inter la naturoj de la bretono kaj de la gaskono.

En 1838, li estis jam akiritaj ĉiujn premiojn de la seminario de Tréguier. Lia fratino Henrika, kiu instruis en Parizo, pere de sia direktoro, kaptis la atenton de la abato Félix Dupanloup, kiu estis kreinta la seminarion de Saint-Nicolas du Chardonnet, lernejo por kune instrui la junajn katolikajn aristokratojn kaj la plej bonajn lernantojn de la seminarioj por plifirmigi la rilatojn inter la aristokrataro kaj le klerikaro. Dupanloup venigis Ernest Renan, kiu estis nur 15-jara kaj neniam estis elrinta Bretonion.

La religio aspektis al li komplete malsama en Tréguier kaj en Parizo. La supraĵa kaj brila pariza katolikismo kontrastis kun la severmora kredo de liaj bretonaj instruistoj.

En 1840, Renan forlasis Saint-Nicolas du Chardonnet por plu studi filozofion en la seminario de Issy-les-Moulineaux, ĉirkaŭurbo de Parizo. La filozofoj Reid kaj Malebranche tuj interesis lin kaj poste Hegel, Kant kaj Herder. Tiam li ekvidis fundamentan kontraŭdiron inter la metafiziko, kiun li studis kaj la kredon, kiun li instruis. Li skribis al sia fratino Henrika, ke la filozofio nur duone kontentigis sian deziregon pri vereco, lin allogis la matematikoj. Lia patrino estis akceptinta pli mondonan postenon en la familio de la grafo Zamoyski. Ŝi plej forte influis sian fraton, morale ŝi eĉ superis lin.

Post sia studoj en Issy, li eniris la seminarion Saint-Sulpice por studi la bibliajn tekstojn antaŭ ol pastrigi kaj komencis lerni la hebrean lingvon. Li tiam konstatis, ke la dua parto de Jesaja malsamas al la unua pro la stilo kaj la dato, ke la gramatiko kaj la historio de Pentateŭko estas post la epoko de Moseo, ke la libro de Daniel estas evidente apokrifa. Mense Renan sin liberigis iom post iom de la katolika kredo.

En la 6-a de Oktobre 1845, Renan forlasis la seminarion de Saint-Sulpice por fariĝi prigardanto en la kolegio Stanislas, estrata de la oratorianoj. Tio eblis nur se li havis eksteran klerikan profesion.

Li rompis sian lastan ligon al la religio, kiam li decidis akcepti la postenon de gastigita lernhelpanto en la privata pensiono de S-ro Crouzet. Li havis malgrandan ĉambron, instruis malpli ol du horojn ĉiutage kaj do havis longan tempon por labori.

Marcellin Berthelot, estonta fama kemiisto, tiam nur 18-jara estis lernanto en la pensiono de S-ro Crouzet malkovrigis al Ernest Renan en 1846 la certajojn de la fiziko kaj de la naturaj sciencoj.

Renan daŭrigis siajn esplorojn pri semida filologio kaj en 1847, li ricevis la premion de Volney, unu el la ĉefaj rekompencoj aljuĝeblaj de la Akademio pri la Skriboj kaj Beletro pro lia manuskripto «Ĝenerala historio de la semidaj lingvoj». En 1847, il fut reçu premier à l'agrégation de Philosophie et nommé professeur au lycée de Vendôme.

Akceptita kiel la unua je la agregacia ekzameno pri filozofio en 1847 (aŭ Septembro 1848?) li estis nomita profesoro en la liceo de Vendôme.

De 1849 ĝis 1850, li estis komisiito en Italio. Li fariĝis doktoro pri beletro sekve de tezo pri la araba filozofo Averroès finita en 1852.

En 1856, li fariĝis membro de la Akademio pri Skriboj kaj Beletro (fr.: Académie des inscriptions et belles-lettres).

En la 11-a de Septembro 1856, li edziĝis al Cornélie Henriette Scheffer, la nevino de la pentristo Ary Scheffer.

De 1860 ĝis 1861, okaze de franca ekspedicio, li faris arkeologian mision en Libano kaj en Sirio. Li restadis kun sia edzino Cornélie kaj sia fratino Henrika en la domo de Zakhia Chalhoub El-Kallab, riĉa maronita komercisto de Amchit (regiono de Byblos), fondinto de la unua hospitalo en Libano (Hôpital Saint Michel de Amchit). Tie Ernest Renan skribis sian ĉefan verkon: "La vivo de Jesuo". Ankaŭ tie, Henrika mortis en 1861, ŝi ripozas en la tombokelo de la familio Zakhia.

En 1862 li fariĝis profesoro pri la hebrea lingvo en la Kolegio de Francio (fr.: Collège de France), sed rapide li estis suspendita pro siaj paroloj juĝitaj sakrilegiaj al Jesuo Kristo. En sia malferma kurso pri la hebrea, kaldea kaj siriaka lingvoj en la Kolegio de Francio, li faris apokalipsan priskribon de la malspriteco de la semida spirito, male al la arja genio kaj al ties heredinto la eŭropa kulturo riĉigita per la grekaj fontoj.

En 1863, la publikigo de "La Vivo de Jesuo" (fr.: *La Vie de Jésus*), skribita dum lia restado en Libano, fariĝis grava sukceso kaj skandalo. La papo Pio la 9-a, tre vundita, malestime nomis lin la eŭropan blasfemanton.

En 1864, la ministro pri publika instruado, Victor Duruy, likvidis lian kurson.

En 1865, li vojaĝis al Egiptio, en la nuna azia Turkio kaj en Grekio.

En 1869, li estis la kandidato de la liberala opozicio por la elekto de la deputitoj en Meaux.

Kaze de sukceso, li estus kuniĝinta al la liberala gupo de la bonapartistoj.

Unu jaron poste, komenciĝis la franca-germana milito, kiu forte influis lin.

Por Ernest Renan, Germanio estis la rifuĝejo de la penso kaj de la neprofitcela scienco. Post la komenco de la milito, li vidis la landon de sia idealo detruita kaj ruinigita sin propran grundon, li ne plu povis konsideri la germanojn kiel pastrojn sed nur kel invadintojn.

En 1871, li publikigis "*la morala kaj intelekta Reformo*" (fr.: *La Réforme intellectuelle et morale*). Ankoraŭ sub la influo de Germanio, li proponis al sia lando, la adopcion de la germana idealo kaj disciplino.

Ankaŭ en 1871, li publikigis "*filozofiaj dialogoj*" (fr.: "*Dialogues philosophiques*"), en 1872: "Ekleziasto" (fr.: "*Ecclésiaste*") kaj en 1876: "Antekristo" (fr. "Antéchrist") (la kvara volumo de "Originoj de kristianismo" (fr.: *Origines du Christianisme*), traktante pri la regon de Nerono). Tiuj verkoj montras nekompareblan beletran genion sed rivelas ankaŭ lian elreviĝon kaj dubecon.

La 13-an de Junio 1878, li estis elektita en la franca Akademio (fr.: Académie française), sur la seĝo 29, kie antaŭe sidis Claude Bernard.

La kvina kaj sesa volumoj de "Originoj de kristianismo" (*La kristana Eklezio ka Marko-Aŭrelio*) montras lian reamikiĝon al demokratio, lian fidon ala paŝpostpaŝa supreniro de la homo, konscia ke la plej gravaj katastrofoj ne vere haltigas la nerimarkeblan sed certan progreson de la mondo.

En 1883, li fariĝis Administranto de la Kolegio de Francio.

En 1883, li publikigis "Infanaj kaj junulaj memoraĵoj" (fr.: *Souvenirs d'enfance et de jeunesse*), kiu estas lia plej konata verko. Tiuj memoraĵoj estas plenaj je la kelta magio de la antikvaj romanoj sed kun la simpleco, la natureco kaj la vereco, kiun multe ŝatis la 19-a jarcento.

Sed lia Ekleziasto anataŭe publikigita kaj liaj "filozofiaj dramoj" publikigita en 1888, liveras pli ĝustan bildon de lia spirito: ĉiam detalema, sed kritika kaj senrevigita. Per ili ni ekscias ke Caliban (la demokratio), estas stulta krudulo, sed kiam ĝi estas lerninta kiel regi sin, ĝi fariĝas tute taŭga reganto; ke Prospero (la spirito aŭ la aristokrata principo) akceptas eksoficiĝi por gajni pli grandan liberecon en la intelekta mondo, poste ke Caliban malkvriĝas keil efika policisto, kiu lasas ĉiujn esplorliberecojn al siaj superuloj; ke Ariel (la religia principo) akiras pli ĝustan senton pri la vivo kaj ne rezignas pri la spiriteco pro la malbona preteksto de la cquiert un ŝanĝiĝo. Fakte, Ariel floras je la servo de Prospero sub la ŝajna regado de nenombreblaj kruduloj. La religio kaj la scio estas same eternaj kiel la mondo, kiujn ili honoras.

Renan estas laborema. Kiam 60-jara, post la "Originoj de Kristianismo" (fr.: *Les Origines de Christianisme*), li komencis "Historio de Izraelo" (fr. : *Histoire d'Israël*), fondinta sur studo, kiu okupis lian tutan vivon, tiu de la Malnova Testamento kaj de *Corpus Inscriptionum Semiticarum*, publikigita sub la regado de la Akademio pri Skriboj kaj Beletro (fr.: Académie des Inscriptions et Belles-Lettres) de 1881 ĝis lia morto. La unua volumo aperis en 1887, la tria en 1891, la du lastaj post lia morto. Kiel historio de faktoj kaj teorioj, la verko ne estas senerara; kiel eseo pri la evoluo de la religia ideo, ĝi estas (malgraŭ kelkaj partoj malpli seriozaj, ironiaj aŭ nekoheraj) grava, por konigi al ni la penson de Ernest Renan, tie li plej vivas.

En volumo ariganta eseojn "malligitaj folioj" (fr. *Feuilles détachées*), publikigita ankaŭ en 1891, estas la sama mensa konduto, aserto de necesa pieco, tamen sendependa de dogmoj.

En la ok lastaj jaroj de la 19-a jarcento, aperis de volumoj de "Historio de Izraelo" (fr. "*Histoire d'Israël*"), liaj leteroj kun lia fratino Henrika, liaj leteroj al S-ro Berthelot kaj "Historio de la religia politiko de Filipo la Bela" (fr.: *Histoire de la Politique Religieuse de Philippe le Bel*), kiun li skribis tuj antaŭ sia edziĝo.

La marŝalo Mac-Mahon rifuzis nomi lin oficiron de la Honora Legio. Ernest Renan fariĝis oficiro de la Honora Legio nur en 1880.

Ernest Renan estis granda oficiro de la Honora Legio, kiam li mortis en la 2-a de Oktobro 1892 en la Kolegio de Francio en Parizo post malsano de kelkaj tagoj. Li estis entombigita en la tombejo Montmartre.

La 13-an de Septembro 1903, oni inaŭguris statuon de Ernest Renan en lia naskurbo Tréguier sub protekto de la polico ĉar ĝi vekis fortajn protestojn.

### 3 La ideoj de Renan

- Fascinita per la scienco kaj la neprofitemo, nuraj sistemoj ebligantaj al la homa scio akumuliĝi de generacio al generacio, dum la eraroj kaj la individuaj egoismoj rezultas al nulo pro la efiko de kontraŭagaj fortoj kaj lasos neniun spuron (vidi ankaŭ la artikolo "noosphère").
- Liaj rilatoj al religio estis kompleksaj. Li kritikis ĝin, kiel pensadsistemon, samtempe asertante ĝian gravecon kiel unuigan faktoron por la homaj socioj same kiel la danĝeron de trorapida deturniĝo. En "La estonteco de scienco", li resumis la situacion dirante : Kiam mi estas en urbo, mi primokas tiun, kiu iras al la meso sed kiam mi estas en la kamparo, male mi primokas tiun, kiun ne tien iras (fr.: *Quand je suis à la ville, je me moque de celui qui va à la messe; mais quand je suis à la campagne, je me moque au contraire de celui qui n'y va pas*).
- Renan tuj aliĝis al la ideo de "natura selektado" proponita de Charles Darwin. Li dividis kun Arthur de Gobineau rasismajn ideojn. Vidi la paragrafon "Superaj kaj malsuperaj rasoj".
- Li ĉiam aspektis malkvieta pri la estonteco de la homaro, timante "ĝian morton proelĉerpiĝo de la malavareco de la koroj, same kiel tiun de industrio eble iam pro la elĉerpiĝo de la terkarbo" (fr.: *sa mort par épuisement de la générosité des cœurs, comme celle de l'industrie peut-être un jour par épuisement du charbon de terre*). Eble niaj posteuloj vivos nur kiel lacertoj, pensante nur pri sunprofito (vidi la paradokson de Fermi).

#### 3.1 Demandoj pri la universo

- La naturo ne estas devigata subiĝi al niaj plaĉetoj. Al tiu deklaro de la homo : "Mi ne povas esti virta sen tiu aŭ alia ĥimero.", la Eternulo rajtas respondi "domaĝe por vi. Viaj ĥimeroj ne povas trudi min ŝanĝi la ordon de la fataleco".
- Pri tiu supera rezultanto de la totala universo, ni povas diri nur tion: ĝi estas bona. Ĉar se ĝi ne estus bona, la tuta universo, kiu ekzistas de antaŭ eterneco, estus pereinta. Ni supozu bankon ekzistantan de antaŭ eterneco. Se tiu banko havus la plej etan difekton en siaj bazoj, ĝi estus bankrotinta milfoje. Se la

bilanco de la mondo ne estus doninta profiton al sia akciuloj, de longe la mondo ne plu ekzistus. () Kial esti se esti ne donus profiton? Estas tiel facile ne esti ! "

- Ĉi-tie, la mistero estas absoluta, ni bone sentas en ni la voĉon de alia mondo, sed ni ignoras kiu estas tiu mondo. Kion diras al ni tiu voĉo? Ion sufiĉe klaran. De kie venas tiu voĉo? Nenio pli malklara. (...) Ĝi eksplodas precipe en tiuj sublimaj absurdaĵoj, kien ni iras, kavankam sciante ke ni eraras, en tiuj kvar gravaj frenezaĵoj de la homo: amo, religio, poezio kaj virto, providencaj senutilaĵoj, kiujn la egoista homo neas kaj kiuj, malgraŭ ĝi, kondukas la mondon."

## 3.2 Pri Bretonio

Renan estis agnoskita dum lia vivo, kaj de la loĝantoj de la tregora regiono kaj de la tuta Bretonio, inkluzive de liaj malamikoj, kiel grava bretona intelektulo.

Iuj citaĵoj de la verko de la universitatulo Jean Balcou, Renan kaj Bretonio (fr. *Renan et la Bretagne*, Champion 1992):

- *Certe evidentas ke bretona Renan ne estas la tuta Renan.* p. 9.
- *Ke Ernest Renan estas unu el la plej gravaj aŭtoroj de la franca kulturo, neniu kontestos. Ke, kun du aliaj bretonoj, Chateaubriand kaj Lamennais, li orientis romantikismon, beletra historiisto kiel Thibaudet jam tion pruvis demonstrante ke la tuta 19-a jarcento staris sur tiu granita bazo.* (p.10).
- *...En la verkaro de Renan estas la konstanteco de la bretona kaj kelta muziko.*
- *... Per la sorto de escepta viro konfrontata al moderneco, kaj kiu kreas tiun modernecon, ni tuŝas trans la Historio al tio, kion ni devas nomi novan "materion de Bretonio".*
- *...mi estis, mi estas patrioto kaj neniam mi seninteresiĝos pri la Granda franca patrio, nek pri la Malgranda bretona patrio.* H. Mauger, *Le Lanionnais*, 11 aŭgusto 1888, « Prelego en Lannion, Parolado de S-ro Renan », p. 27.
- *...ni, bretonoj, estas obstinaj.. En tio, mi vere estis bretono.* *Journal des Débats*, 4 aŭgusto 1884, paroladoj kaj prelegoj 1887. Citita en la verko de Balcou.

Aliflanke, laŭ pluraj atestoj, Renan parolis bretone kun sia patrino.

Nei al Renan la kvalifikaĵo de "bretona verkisto" estus kontraŭstari al la deklaroj de la verkisto mem.

## 3.3 Pri judaismo

Gravas antaŭ ol liveri eltiraĵojn rememorigi, ke Renan ne kaŝis sian admiron por la juda popolo, la sola, kiu sukcesis dum longa tempo esti sen tiu ĥimero de la individua

pluvivado (fr.: *le seul à avoir su se passer longtemps de cette chimère de la survie individuelle*) kaj al kiu li ne riproĉis – fine de profunda analizo fondita sur la datado de tekstoj (Proverboj, Ekleziasto, Libro de Ijob, ktp.) – sin lasi finfine infekti per tiu nocio, juĝita absurda de li. La judaismo tiam fariĝis religio kiel la aliaj, rezignante al tio, kio dum longa tempo estis ĝia honoro fronte al ili (Renan estis profesia filologo).

Kaj tamen, li skribis : La homo povas fari tre gravajn aferojn sen kredi je la senmorteco; sed necesas kredi ĝin por ĝi kaj ĉirkaŭ ĝi (fr.: *L'homme peut faire de très grandes choses sans croire à l'immortalité ; mais il faut qu'on y croie pour lui et autour de lui*).

"Renan obstinemas ripari per iu mano tion, kion la alia detruis (fr.: "*Renan s'acharne à réparer d'une main ce qu'il détruit de l'autre*", diris pri li George Sand.

### 3.4 Pri Dio kaj la scienco

- [Kiam la scienco estos priskribinta ĉion, kio estas konebla en la universo], Tiam Dio estos kompleta, se la vorto Dio estas sinonimo de la tuta ekzisto. Tiusence, Dio estos pli ol ĝi estas: li estas in fieri, li estas fariĝanta. Sed halti tie estus teologio tro malkompleta. Dio estas pli ol la tuta ekzisto, li estas samtempe la absoluto. Li estas en la ordo, kie la matematikoj, la metafiziko, la logiko estas veraj, ĝi estas la loko de la idealo, la viva principo de la bono, de la belo kaj de la vero. Konsiderata tiel, Dio estas plene kaj senrezerva; ĝi estas eterna kaj senŝanĝa, sen progreso kaj evoluo". (fr.: « [Quand la science aura décrit tout ce qui est connaissable dans l'univers], Dieu alors sera complet, si l'on fait du mot Dieu le synonyme de la totale existence. En ce sens, Dieu sera plutôt qu'il n'est: il est *in fieri*, il est en voie de se faire. Mais s'arrêter là serait une théologie fort incomplète. Dieu est plus que la totale existence, il est en même temps l'absolu. Il est de l'ordre où les mathématiques, la métaphysique, la logique sont vraies, il est le lieu de l'idéal, le principe vivant du bien, du beau et du vrai. Envisagé de la sorte, Dieu est pleinement et sans réserve; il est éternel et immuable, sans progrès ni devenir ». El "Dialogo kaj filozofiaj fragmentoj" (fr.: *Dialogue et fragments philosophiques*).

### 3.5 Pri arto

- "Nia raso ne ekis pro la gusto de la komforto kaj komerco. Ĝi estis morala, brava, milita, ĵaluza pri libereco kaj honoro, amanta la naturon, kapabla je sindonemo, preferante multon ol la vivo. La negocon, la industrion okazigis grandskale por la unua fojo semidaj popoloj, aŭ almenaŭ parolantaj semidan lingvon, la fenicoj. Mezepoke, ankaŭ la araboj kaj la judoj fariĝis mastroj pri komerco. La tuta eŭropa lukso, de la antikveco ĝis la 17-a jarcento, venis de Oriento. Mi diras la lukson sed ne la arton: Estas senfineco inter la unua kaj la alia."
- Fr.: « *Notre race ne débuta point par le goût du confortable et des affaires. Ce fut une race morale, brave, guerrière, jalouse de liberté et d'honneur, aimant la nature, capable de dévouement, préférant beaucoup de choses à la vie. Le négoce, l'industrie ont été exercés pour la première fois sur une grande échelle par des peuples sémitiques, ou du moins parlant une langue sémitique, les Phéniciens. Au Moyen Âge, les Arabes et les Juifs furent aussi nos maîtres en fait de commerce. Tout le luxe européen, depuis l'Antiquité jusqu'au XVIIe*

*siècle, est venu de l'Orient. Je dis le luxe et non point l'art : il y a l'infini de l'un à l'autre... ».* El "Kio estas nacio?" (fr.: Qu'est ce qu'une nation ?).

### 3.6 Pri islamo

Same kiel plej multaj tiuepokaj orientalistoj, Renan prezentas negativan bildon de Islamo, kiu estus konstruiĝinta nur kontraŭ Okcidento.

- "La islama religio povas ekzisti nur kiel oficiala religio; kiam oni reduktos ĝin je la stato de libera kaj individua religio, ĝi pereos. Islamo ne estas nur ŝtata religio, kiel estis katolikismo en Francio, sub Ludoviko la 14-a, kiel ĝi estas ankoraŭ en Hispanio, tio estas la religio kiu ekskludas la Ŝtaton... Tie estas la eterna milito, la milito, kiu ĉesos nur kiam la lasta filo de Iŝmael' mortos pro mizero aŭ estos rifuĝinta pro teroro en la fundo de la dezerto. Islamo estas la plej kompleta neado de Eŭropo, Islamo estas la fanatikismo, kiel Hispanio en la tempo de Filipo la 2-a kaj Italio en la tempo de Pio la 5-a apenaŭ konis ĝin. Islamo estas la malŝato de la scienco, la forigo de la civila socio; tio estas la terura simpleco de la semida spirito, ŝrumpiganta la homan menson, fermante ĝin al ĉiu delikata ideo, al ĉiu fajna sento, al ĉiu racia serĉo, por meti ĝin fronte al eterna taŭtologio: Dio estas Dio..."
- Fr.: « *...l'islamisme [à l'époque, sens général de "religion musulmane"] ne peut exister que comme religion officielle; quand on le réduira à l'état de religion libre et individuelle, il périra. L'islamisme n'est pas seulement une religion d'État, comme l'a été le catholicisme en France, sous Louis XIV, comme il l'est encore en Espagne, c'est la religion excluant l'État... Là est la guerre éternelle, la guerre qui ne cessera que quand le dernier fils d'Ismaël sera mort de misère ou aura été relégué par la terreur au fond du désert. L'Islam est la plus complète négation de l'Europe; l'Islam est le fanatisme, comme l'Espagne du temps de Philippe II et l'Italie du temps de Pie V l'ont à peine connu; L'Islam est le dédain de la science, la suppression de la société civile; c'est l'épouvantable simplicité de l'esprit sémitique, rétrécissant le cerveau humain, le fermant à toute idée délicate, à tout sentiment fin, à tout recherche rationnelle, pour le mettre en face d'une éternelle tautologie : Dieu est Dieu... ».* El Parolado en la Kolegio de Francio "Pri la parto de la semidaj popoloj en la historio de la civilizacio (fr.: *De la part des peuples sémitiques dans l'Histoire de la civilisation*), 1862 – Islamo kaj Scienco (fr.: *L'Islam et la Science*), 1883.

### 3.7 Pri superaj kaj malsuperaj rasoj

- "Vi verkis unu el la plej rimarkindaj libroj, plenan je vigleco kaj spiritoriginaleco, tamen malmulte farita por esti komprenata en Francio aŭ pli ĝuste por estis malbone komprenata. La franca spirito nefacile traktas la etnografiajn konsiderojn; Francio malmulte kredas je la raso, [...] La fakto de la raso estis grava je la origino; sed li pli kaj pli perdas sian gravecon, kaj kelkfoje en Francio, ĝi tute malaperas. Ĉu tiam oni povas absolute paroli pri dekadenco? Jes, certe laŭ la vidpunkto de la institucioj, de la originaleco de la karakteroj, de tiu nobleco, kiujn miaflanke, tre gravas por la tuto de la homaĵoj. Sed ankŭ kiom da kompensoj! Sendube, se la noblaj elementoj miksitaj al la



sango de popolo finfine forviŝiĝus komplete, tiam estus malnobliga egaleco, simila al tiu de iuj orientaj Ŝtatoj, kaj laŭ iuj aspektoj al Ĉinio. Sed fakte, tre malgranda kvanto da nobla raso enmetita en la vivo de popolo sufiĉas por nobligi ĝin, almenaŭ por la historiaj efikoj; Tiel Francio, nacio tiel komplete falinta en nenobelego, ludas fakte en la mondo la rolon de nobelo. Flanken metante la rasojn absolute malsuperajn, kies enmikso en la gravaj rasoj povus nur veneni la homan specion, mi imagas por la estonteco homogenan omaron".

- Fr.: « *Vous avez fait là un livre des plus remarquables, plein de vigueur et d'originalité d'esprit, seulement bien peu fait pour être compris en France ou plutôt fait pour y être mal compris. L'esprit français se prête peu aux considérations ethnographiques: la France croit très peu à la race, [...] Le fait de la race est immense à l'origine; mais il va toujours perdant de son importance, et quelquefois comme en France, il arrive à s'effacer complètement. Est-ce là absolument parler de décadence ? Oui, certes au point de vue de la stabilité des institutions, de l'originalité des caractères, d'une certaine noblesse dont je tiens pour ma part le plus grand compte dans l'ensemble des choses humaines. Mais aussi que de compensations ! Sans doute si les éléments nobles mêlés au sang d'un peuple arrivaient à s'effacer complètement, alors ce serait une avilissante égalité, analogue à celle de certains États de l'Orient et, à quelques égards de la Chine. Mais c'est qu'en réalité une très petite quantité de sang noble mise dans la circulation d'un peuple suffit pour l'ennoblir, au moins quant aux effets historiques ; c'est ainsi que la France, nation si complètement tombée en roture, joue en réalité dans le monde le rôle d'un gentilhomme. En mettant à part les races tout à fait inférieures dont l'immixtion aux grandes races ne ferait qu'empoisonner l'espèce humaine, je conçois pour l'avenir une humanité homogène* ». El letero sendita al Arthur de Gobineau en 1856 post lego de lia eseo pri la neegaleco de la homaj rasoj.
- Naturo faris rason de laboristoj: la ĉinan rason kun mirinda manlerteco, preskaŭ sen honorsento. Regu ĝin kun justeco, deprenante de ĝi por la bono de tia registaro ampleksan imposton profite al la konkera raso, ĝi estos kontenta; rason de terlaboristoj: la negrojn; estu bona kaj homa por ili kaj ĉio estos en ordo; rason de mastroj kaj soldatoj: la eŭropan rason. Ĉiu faru tion por kio li estis farita kaj ĉio iros glate.
- Fr.: « ... *La nature a fait une race d'ouvriers. C'est la race chinoise d'une dextérité de main merveilleuse, sans presque aucun sentiment d'honneur ; gouvernez-la avec justice en prélevant d'elle pour le bienfait d'un tel gouvernement un ample douaire au profit de la race conquérante, elle sera satisfaite ; une race de travailleurs de la terre, c'est le nègre : soyez pour lui bon et humain, et tout sera dans l'ordre ; une race de maîtres et de soldats, c'est la race européenne. Que chacun fasse ce pour quoi il est fait et tout ira bien* ». El "La morala kaj intelekta reformo" (fr.: "La Réforme intellectuelle et morale"), 1871.
- Grandskala koloniado estas politika neceseco absolute unuaranga... La konkero de rasmalsupera lando far supera raso ne estas ŝoka. Fr.: « *La colonisation en grand est une nécessité politique tout à fait de premier ordre... La conquête d'un pays de race inférieure par une race supérieure n'a rien de choquant...* ». El "La Réforme intellectuelle et morale", 1871.

- La neegaleco de la rasoj estas konstatita. Fr.: « *L'inégalité des races est constatée* ». El la antaŭparolo de "L'avenir de la science", 1890.

Sed lia serĉo de honesteco estis lin flankenigi ĉiun simplismon:

- Veraĵo estas ke ne ekzistas pura raso kaj ke bazigi la politikon sur la etnografia analizo, tio estas bazigi ĝin sur ĥimero. La plej noblaj landoj: Anglio, Francio, Italio estas tiuj, kiuj estas mikse sangaj. Ĉu Germanio estas escepta tiurilate? Ĉu ĝi estas pura germana lando? Kia iluzio! La tuta sudo estis gaŭla. La tuta oriento, de la riverego Elbo, estas slava. Kaj ĉu la partoj, kiujn oni konsideras puraj estas vere puraj? Tio estas unu el la problemoj pri kiuj gravas havi klarajn ideojn kaj antaŭeviti la miskomprenojn. Fr.: « *La vérité est qu'il n'y a pas de race pure et que faire reposer la politique sur l'analyse ethnographique, c'est la faire porter sur une chimère. Les plus nobles pays, l'Angleterre, la France, l'Italie, sont ceux où le sang est le plus mêlé. L'Allemagne fait-elle à cet égard une exception ? Est-elle un pays germanique pur ? Quelle illusion ! Tout le Sud a été gaulois. Tout l'Est, à partir d'Elbe, est slave. Et les parties que l'on prétend réellement pures le sont-elles en effet ? Nous touchons ici à un des problèmes sur lesquels il importe le plus de se faire des idées claires et de prévenir les malentendus* ». El "Kio estas nacio?" (fr.: Qu'est-ce qu'une nation ?), 1882.

Dum lia tuta vivo, li vere denunciis la abomenan manion de la certeco. Fr.: « l'horrible manie de la certitude. ».

### 3.8 Antaŭscio pri la estontaj militoj

Male al Victor Hugo, kiu opinis ke en la 20-a jarcento venus la tempo de la monda paco, Renan, antaŭ la kultura monolitismo de Pruso, konjektas ke tiu sinteno nur kondukos al ekstermaj militoj, similaj al tiuj de la diversaj specioj de ronguloj aŭ de karnomanĝuloj por la pluvivo. Tio estus la fino de tiu fekunda miksaĵo, konsistanta el multnombraj elementoj kaj ĉiuj necesaj, kiu nomiĝas homaro" (fr.: « mener qu'à des guerres d'extermination, analogues à celles que les diverses espèces de rongeurs ou de carnassiers se livrent pour la vie. Ce serait la fin de ce mélange fécond, composé d'éléments nombreux et tous nécessaires, qui s'appelle l'humanité »).

## 4 Liaj verkoj

- *Ĝenerala Historio kaj komparaj sistemoj de la semidaj lingvoj* (fr.: *Histoire générale et systèmes comparés des langues sémitiques*) (1845)
- *Pri la origino de la parolo* (fr.: *De l'origine du langage*) (1848-1858)
- *Averoeso kaj la averoesismo* (fr.: *Averroës et l'averroïsme*) (1852) - filozofio
- *De philosophia peripatetica, apud Syros* (1852) - filozofio
- *La bretona animo* (fr.: *L'âme bretonne*) (1854)
- *Ĝenerala historio de la semidaj lingvoj* (fr.: *Histoire générale des langues sémitiques*) (1855)
- *Esploroj pri religia historio* (fr.: *Études d'histoire religieuse*) (1857)
- *Pri la origino de la lingvoj* (fr.: *De l'origine du langage*) (1858)
- *La libro de Ijob'* (fr.: *Le livre de Job*) (1858)

- *Eseoj pri la moralo kaj la kritiko* (fr.: *Essais de morale et de critique*) (1859)
- *La kantiko de la kantikoj* (fr.: *Le cantique des cantiques*) (1860)
- *Henrika Renan, memoraĵo por tiuj, kiuj konis ŝin* (fr.: *Henriette Renan, souvenir pour ceux qui l'ont connue*) (1862)
- *Misio al Fenicio* (fr.: *Mission de Phénicie*) (1864-1874)
- *Preĝo sur Akropolo* (fr.: *Prière sur l'Acropole*) (1865)
- *Beletra historio de Francio en la 14-a jarcento* (fr.: *Histoire littéraire de la France au XIVe siècle*) (1865), kunlabore kun Victor Le Clerc
- *Historioj pri la originoj de kristianismo* (fr.: *Histoires des origines du Christianisme*) - 7 volumoj - (1863-1881)
  - *Vivo de Jesuo* (fr.: *Vie de Jésus*) (1863)
  - *La apostoloj* (fr.: *Les apôtres*) (1866)
- *Nuntempaj demandoj* (fr.: *Questions contemporaines*) (1868) -politiko
  - *Sankta Paŭlo* (fr.: *Saint Paul*) (1869)
- *La intelekta kaj morala reformo* (fr.: *La réforme intellectuelle et morale*) (1871)
  - *Antekristo* (fr.: *L'antéchrist*) (1873)
- *Dialogoj kaj filozofiaj fragmentoj* (fr.: *Dialogues et fragments philosophiques*) (1876)
  - *La evangelioj kaj la dua kristana generacio* (fr.: *Les évangiles et la seconde génération chrétienne*) (1877)
- *Miksaĵo de historio kaj de vojaĝoj* (fr.: *Mélanges d'histoire et de voyages*) (1878)
- *Kaliban* (fr.: *Caliban*) (1878) - filozofia dramo (unua volumo)
  - *La kristana Eklezio* (fr.: *L'église chrétienne*) (1879)
- *Prelegoj en Anglio* (fr.: *Conférences d'Angleterre*) (1880)
- *La ekleziulo* (fr.: *L'ecclésiaste*) (1881)
- *La rejuniga akvo* (fr.: *L'eau de Jouvence*) (1881) – filozofia dramo (dua volumo)
  - *Marko-Aŭrelio kaj la fino de la antikva mondo* (fr.: *Marc-Aurèle et la fin du monde antique*) (1882)
- *Kio estas nacio?* (fr.: *Qu'est-ce qu'une nation ?*) (Prelego en la 11-an de Marto 1882 en la Universitato Sorbono)
  - *Indekso* (fr.: *Index*) (1883)
- *Infanaj kaj junulaj memoraĵoj* (fr.: *Souvenirs d'enfance et de jeunesse*) (1883)
- *Novaj esploroj pri religia historio* (fr.: *Nouvelles études d'histoire religieuse*) (1884)
- *La budhismo* (fr.: *Le bouddhisme*) (1884)
- *La pastro de Némi* (fr.: *Le prêtre de Némi*) (1885) – filozofia dramo (tria volumo)
- *La abatino de Jouarre* (fr.: *L'abbesse de Jouarre*) (1886) – filozofia dramo (kvara volumo)
- *Paroladoj kaj prelegoj* (fr.: *Discours et conférences*) (1887)
- *Historio pri la popolo de Izraelo* (fr.: *Histoire du peuple d'Israël*) (1887-1893), 5 volumoj
- *Filozofia memekzameno* (fr.: *Examen de conscience philosophique*) (1889)
- *La estonteco de la scienco, pensoj de 1848* (fr.: *L'avenir de la science, pensées de 1848*) (1890)
- *Malligitaj folioj* (fr.: *Feuilles détachées*) (1892)

===== morto de Ernest Renan =====

- *Intimaj leteroj* (fr.: *Lettres intimes*) (1896)
- *Korespondadokun Berthelot* (fr.: *Correspondance avec Berthelot*) (1898)
- *Esploroj pri la religia politiko en la regno de Filipo la Bela* (fr.: *Études sur la politique religieuse du règne de Philippe le Bel*) (1899)
- *Leteroj de la seminario* (fr.: *Lettres du séminaire*) (1902)
- *Religiaj kaj historiaj miksaĵoj* (fr.: *Mélanges religieux et historiques*) (1904)
- *Kajeroj de junaĝo* (fr.: *Cahiers de jeunesse*) (1906)
- *Novaj kajeroj de junaĝo* (fr.: *Nouveaux cahiers de jeunesse*) (1907)
- *Patriko* (fr.: *Patrice*) (1908)
- *Emanuela* (fr.: *Emanuelle*) (1913) - korespondado
- *Intimaj kaj romanecaj fragmentoj* (fr.: *Fragments intimes et romanesques*) (1914)
- *Psikologia esejo pri Jesuo Kristo* (fr.: *Essai psychologique sur Jésus-Christ*) (1921)
- *Novaj intimaj leteroj* (fr.: *Nouvelles lettres intimes*) (1923)
- *Leteroj al lia frato Alano* (fr.: *Lettres à son frère Alain*) (1926)
- *Korespondado* (fr.: *Correspondance*) (1927)
- *Vojaĝoj: Italio, Norvegio* (fr.: *Voyages : Italie, Norvège*) (1928)
- *Pri Kornelio, Racino kaj Bossuet* (fr.: *Sur Corneille, Racine et Bossuet*) (1928)
- *Laboroj de junaĝo* (fr.: *Travaux de jeunesse*) (1931)
- *La poezio de la keltaj rasoj* (fr.: *La poésie des races celtiques*) (sen dato).

## 5 Citaĵoj de Ernest Renan

**La deziro de pli bona stato estas la fonto de la tuta malbono en la mondo**

Fr.: «Le désir d'un meilleur état est la source de tout le mal dans le monde.»

**Mi estis amata de la kvar virinoj, kiuj plej gravis por mi: mia patrino, mia fratino, mia edzino kaj mia filino**

Fr.: «J'ai été aimé des quatre femmes dont il m'importait le plus d'être aimé, ma mère, ma soeur, ma femme et ma fille.»

**Patrio konsistas el la mortintoj, kiuj fondis ĝin, kaj el la vivantoj, kiuj daŭrigas ĝin.**

Fr.: «Une patrie se compose des morts qui l'ont fondée aussi bien des vivants qui la continuent.» El "Paroladoj kaj prelegoj" (fr.: *Discours et conférences*)

**Por naciaj memoraĵoj, funebroj pli valoras ol triumfoj; ĉar ili trudas devojn, ili komandas komunajn klopodojn**

Fr.: «En fait de souvenirs nationaux, les deuils valent mieux que les triomphes ; car ils imposent des devoirs, ils commandent l'effort en commun.»

El "Kio estas nacio?" (fr.: *"Qu'est-ce qu'une nation ?"*)

**Kiam oni rajtas erari senpune, tiam oni estas ĉiam certa sukcesi.**

Fr.: «Quand on a le droit de se tromper impunément, on est toujours sûr de réussir.»

**La nacio, same kiel la individuo, estas la rezulto de longa pasintaĵo de klopodoj, foroferoj kaj sindediĉoj.**

**Fr.:** «La nation, comme l'individu, est l'aboutissant d'un long passé d'efforts, de sacrifices et de dévouements.». El "Paroladoj kaj prelegoj" (fr.: *Discours et conférences*)

**Kiu scias ĉu la vereco ne estas malĝoja.**

**Fr.:** «Qui sait si la vérité n'est pas triste.»

**Kio konsistigas nacion, ne estas paroli la saman lingvon aŭ aparteni al komuna etna grupo, sed estas esti kune farinta grandajn agojn en la pasinteco kaj voli ankoraŭ fari aliajn en la estonteco.**

**Fr.:** «Ce qui constitue une nation, ce n'est pas de parler la même langue, ou d'appartenir à un groupe ethnographique commun, c'est d'avoir fait ensemble de grandes choses dans le passé et de vouloir en faire encore dans l'avenir.»

El "Kio estas nacio?" (fr.: "*Qu'est-ce qu'une nation ?*")

**La celo de la homaro estas produkti gravajn homojn.**

**Fr.:** «Le but de l'humanité, c'est de produire de grands hommes.»

**Eblus, ke la vereco estu malĝoja.**

**Fr.:** «Il se pourrait que la vérité fût triste.»

**Ho Sinjoro, se estas Sinjoro, savu mian animon, se mi havas animon.**

**Fr.:** «O Seigneur, s'il y a un Seigneur ; sauvez mon âme, si j'ai une âme.». El "Preĝo de skeptikulo" (fr.: "*Prière d'un sceptique*")

**Se doktrino estas vera, ne timu ĝin; se ĝi estas malvera, timu eĉ malpli, ĉar ĝi mem disfalos.**

**Fr.:** «Si une doctrine est vraie, il ne faut pas la craindre ; si elle est fautive, encore moins, car elle tombera d'elle-même.». El "La estonteco de scienco" (fr.: *L'avenir dans la science*)

**La larmoj de ĉiuj popoloj estas veraj larmoj, la revoj de ĉiuj saĝuloj entenas parton de vereco. Ĉio surtera estas nur simbolo kaj sonĝo.**

**Fr.:** «Les larmes de tous les peuples sont de vraies larmes ; les rêves de tous les sages renferment une part de vérité. Tout n'est ici-bas que symbole et que songe.». El "Junaĝaj kaj junulaj memoraĵoj" (fr.: *Souvenirs d'enfance et de jeunesse*)

**Vereco estos iam forto. "Scii estas kapabli" estas la plej bona vorto, kiun mi aŭdis.**

**Fr.:** «La vérité sera un jour la force. "Savoir, c'est pouvoir" est le plus beau mot qu'on ait dit.». El "Filozofiaj dialogoj kaj fragmentoj" (fr.: *Dialogues et fragments philosophiques*)

**Tio, kio estas malordo, perforto, atenco al la rajto de aliuloj, devas esti punita sen kompatato.**

**Fr.:** «Ce qui est désordre, violence, attentat au droit d'autrui, doit être réprimé sans pitié.». El "Nuntempaj demandoj" (fr.: "*Questions contemporaines*")

**Du elementoj: la tempo kaj la tendenco al progreso, klarigas la universon.**

**Fr.:** «Deux éléments, le temps et la tendance au progrès, expliquent l'univers.»

**La rimedo por ne varii, estas ne pensi.**

**Fr.:** «Le moyen de ne pas varier, c'est de ne pas penser.» El "La estonteco de la scienco" (fr.: *L'avenir de la science*)

**Dio estas tute dia kaj senrezerva, li estas eterna kaj senŝanĝa, sen progreso nek evoluo**

**Fr.:** «Dieu est pleinement et sans réserve ; il est éternel et immuable, sans progrès ni devenir.» El "Letero al Marcelin Berthelot" (fr.: *Lettre à Marcelin Berthelot – Aŭgusto 1863*)

**La virino rekomunikigas nin kun la eterna fonto, en kiu sin speguliĝas.**

**Fr.:** «La femme nous remet en communication avec l'éternelle source où Dieu se mire.» El "Junaĝaj kaj junulaj memoraĵoj" (fr.: *Souvenirs d'enfance et de jeunesse*)

**La supozita Dio de la armeoj estas ĉiam por la nacio, tiu kiu havas la plej bonan artilerion kaj la plej bonajn generalojn.**

**Fr.:** «Le prétendu Dieu des armées est toujours pour la nation qui a la meilleure artillerie, les meilleurs généraux.»

**Kiom da gravaj homoj ŝuldis famon al la nomo, kiun ili hazarde heredis de siaj gepatroj.**

**Fr.:** «Combien de grands hommes ont dû la célébrité au nom que, par hasard, ils ont reçu de leurs parents.»

**Ĉiu generacio ŝuldas al la sekvanta, tion kion ĝi ricevis de siaj antaŭaj: instalita socia ordo.**

**Fr.:** «Chaque génération doit à la suivante ce qu'elle a reçu de ses devancières, un ordre social établi.» El "Filozofiaj dialogoj kaj fragmentoj" (fr.: *Dialogues et fragments philosophiques*)

**La senmorteco, estas la ribelo kontraŭ situacio kies trompo estas videbla.**

**Fr.:** «L'immortalité, c'est la révolte contre un état de choses dont on voit la duperie.» El "Filozofiaj dialogoj kaj fragmentoj" (fr.: *Dialogues et fragments philosophiques*)

**La deziro estas la grava providenca stimulilo por agadi, ĉiu deziro estas iluzio, sed ĉio estas tiel lokita, ke oni ekvidas la vantecon de la deziro, nur post ĝia plenumo.**

**Fr.:** «Le désir est le grand ressort providentiel de l'activité ; tout désir est une illusion, mais les choses sont ainsi disposées qu'on ne voit l'inanité du désir qu'après qu'il est assouvi.» El "Filozofiaj dialogoj kaj fragmentoj" (fr.: *Dialogues et fragments philosophiques*)

**La senmorteco estas labori al eterna verko.**

**Fr.:** «L'immortalité c'est de travailler à une oeuvre éternelle.»

**Mi klare vidas ke la talento valoras nur ĉar la mondo estas infaneca. Se la publiko havus pli da karaktero, la vereco sufiĉus al ĝi.**

**Fr.:** «Je vois très bien que le talent n'a de valeur que parce que le monde est enfantin. Si le public avait la tête assez forte, il se contenterait de la vérité.». El "Unuaj paŝoj ekster Saint-Sulpice" (fr.: *Premiers pas hors de Saint-Sulpice*)

**Sed libereco estas kiel vereco, preskaŭ neniu ŝatas ĝin por ĝi mem, kaj tamen, pro la neebleco de la ekstremaĵoj, ĉiam ni revenas al ĝi.**

**Fr.:** «Mais la liberté est comme la vérité : presque personne ne l'aime pour elle-même, et cependant, par l'impossibilité des extrêmes, on y revient toujours.». El "Junaĝaj kaj junulaj memoraĵoj" (fr.: *Souvenirs d'enfance et de jeunesse*)

**La kredo estas aparta, ĉar eĉ post malapero, ĝi daŭre agas.**

**Fr.:** «La foi a cela de particulier que, disparue, elle agit encore.». El "Junaĝaj kaj junulaj memoraĵoj" (fr.: *Souvenirs d'enfance et de jeunesse*)

**Iam venos la tempo, kiam la homaro ne plu kredos, sed scios.**

**Fr.:** «Il viendra un jour où l'humanité ne croira plus, mais où elle saura.». El "La estonteco de la scienco" (fr.: *L'avenir de la science*)

**En la homo estas io supera al la lingvo: la volo.**

**Fr.:** «Il y a dans l'homme quelque chose de supérieur à la langue, c'est la volonté.»

**Nur la homa stulteco provizas ideon pri la senfineco.**

**Fr.:** «La bêtise humaine est la seule chose qui donne une idée de l'infini.». El "Filozofiaj dialogoj kaj fragmentoj" (fr.: *Dialogues et fragments philosophiques*)

**La matematikoj, scienco pri eterneco kaj senŝanĝeco, estas la scienco de la nerealaĵo.**

**Fr.:** «Les mathématiques, science de l'éternel et de l'immuable, sont la science de l'irréel.»

**La ridantoj neniam regos.**

**Fr.:** «Les rieurs ne régneront jamais.»

**La vera marko de alvokiĝo estas la neebleco perfidi ĝin, tio estas sukcesi en io malsama ol la celo de nia kreiĝo.**

**Fr.:** «La vraie marque d'une vocation est l'impossibilité d'y forfaire, c'est-à-dire de réussir à autre chose que ce pourquoi l'on a été créé.». El "Junaĝaj kaj junulaj memoraĵoj" (fr.: *Souvenirs d'enfance et de jeunesse*)

**Estis birdoflugoj, aerblovoj, migrenoj, kiuj decidis pri la sorto de la mondo.**

**Fr.:** «Il y a eu des vols d'oiseaux, des courants d'air, des migraines qui ont décidé du sort du monde.»

**Francio eminentas en delikateco; ĝi senvaloras en komuneco.**

**Fr.:** «La France excelle dans l'exquis ; elle est médiocre dans le commun.». El "La intelekta kaj morala reformo de Francio" (fr.: *La réforme intellectuelle et morale de la France*)

**La elekto stimulas la ĉarlatanecon.**

**Fr.:** «L'élection encourage le charlatanisme.» El "La intelekta kaj morala reformo de Francio" (fr.: *La réforme intellectuelle et morale de la France*)

**La junularo kapablas ĉiujn sinoferojn.**

**Fr.:** «La jeunesse est capable de toutes les abnégations.» El "Vivo de Jesuo" (fr.: *Vie de Jésus*)

**Tio, kion oni diras pri si, estas ĉiam poezio.**

**Fr.:** «Ce qu'on dit de soi est toujours poésie.» El "Junaĝaj kaj junulaj memoraĵoj" (fr.: *Souvenirs d'enfance et de jeunesse*)

**La ideoj kondukas la mondon.**

**Fr.:** «Ce sont les idées qui mènent le monde.»

## 6 Referencoj

[1] Vikipedio en esperanto

[2] Vikipedio en la franca lingvo

[3] Académie française (eo: franca Akademio)

[4] Cercle Ernest Renan (eo: Rondo Ernest Renan)